AVENO #52 - Ekologio kaj Ekonomio - 2026

Kaj jen ĉio pri internaciaj tagoj, semajnoj, jaroj - en ĉiuj 6 UN-lingvoj:
https://www.un.org/en/observances
- - -
21a de Marto estas la Tago de la Arbaroj (FAO), kaj de Glaĉeroj (UNESCO)

21a de Marto estos unua monda internacia tago por la glaĉeroj
kaj 2025 estas la Jaro por protekti glaĉerojn

**22-a de Marto estas la Tago de Akvo**
22-a de Aprilo estas la Tago de la Tero.
05-a de Junio estas la Tago de la Naturmedio.
08-a de Junio estas la Tago de la Maroj.
26-a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto
07-a de Septembro estas la Internacia Tago de Pura Aero kaj Blua Chielo.
26-a de Septembro Internacia Tago de Kontraŭ-Koncipado
30a de Septembro estas la Internacia Tago de Tradukado
https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_tago_pri_tradukado

19a de Novembro estas la World Toilet Day (grund-akvo, kaj perdo de mineraloj (P, K, NOx) se oni forĵetas la fekaĵojn - de la homaro.
Kaj jen ĉio pri internaciaj tagoj, semajnoj, jaroj - en ĉiuj 6 UN-lingvoj:
>un.org/en/observances

2022-12-31 Sur la Tero vivas 8 miljardoj da homoj !

2023-07-28 La homaro sur Tero jam foruzis tiom da resursoj kiom eblintus dum la tuta jaro por nia planedo
2024-08-01 Tago de Trouzado
>overshoot.footprintnetwork.org/

2024-09-26 Tago de Koncipado
WHO kaj DSW rakontas, ke en Afriko ĉiu 10-a junulino naskas sian unuan idon antaŭ la aĝo de 18. Tio estas malbone por la junulino, kaj por la sano kaj por ŝia estonteco.
>dsw.org

2025-08-29 Internacia Tago Kontraŭ Atombombaj Testoj
= = = = =

2026-06-02 Maraj gresoj kolektas mikro-plastaĵon
La mara greso Polidonia kvazaŭ kolektas mikro-plastaĵon, eĉ tia kiu estas pli densaj ol akvo kaj ne naĝas surface (kiel ekzemple PET aŭ PVC). Ĉi tiu natura polukontrola procezo, tute sen homa interveno, transportas ĉi tiun rubon reen al la bordo, kie ĝi povas

esti kolektita en formo de buloj de morta greso – eble ili ankaŭ transportas la semojn tiamaniere.

Tamen, ĉi tiu ekosistema servo estas minacata. 50% de la marherbaj herbejoj de Posidonio malaperis ekde 1960 (Sanchez-Vidal et al., 2021)* - viktimoj de marborda evoluo, ankrado de boatoj kaj klimata ŝanĝo. Ĉi tio estas alarma perdo, ĉar ĉi tiuj ekosistemoj subtenas 25% de la mediteranea biodiverseco (Lefebvre et al., 2023).

> expedition-med.org/actualites/les-pelotes-de-posidonie-alliees-insoupconnees-contre-la-pollution-plastique-en-mediterranee/

= =

2026-05-29 AMOC - La Atlantika Meridiana Renversa Cirkulado (AMOC/AMRC)

estas decida komponanto de la tutmonda klimata sistemo, transportante varman tropikan akvon al Eŭropo kaj la Arkto, kie ĝi malvarmiĝas kaj sinkas por formi profundan, malvarman fluon. Kolapso pro hom-induktita klimata ŝanĝo rezultigus ekstreme malvarmajn vintrojn kaj somerajn sekiĝojn en Okcidenta Eŭropo, ŝovus la tropikan pluvozonon, de kiu milionoj da homoj dependas por manĝaĵproduktado, kaj kaŭzus, ke la jam altiĝanta marnivelo en Atlantiko pliiĝus je 50 ĝis 100 cm. Ĉi tiu fluo jam estas je sia plej malforta nivelo en 1000 jaroj. Kolapso de la AMOK tial estus katastrofa. Krome, tia kolapso reprezentus renversopunkton: daŭrus jarmiloj por ke la AMOK resaniĝu.

Lastatempaj analizoj de ekzistanta esplorado montras, ke la AMOC reduktiĝos je proksimume 51 procentoj antaŭ la jaro 2100.

Jen peticio:

https://weact.campact.de/petitions/klimawandel-atlantische-umwalzstomung-jetzt-auf-den-kollaps-vorbereiten

- -

2025 Aral-maro – saveblo pere de teknologio

Dank al artikolo de Global Voices – kaj la traduko de Tonio Barrio ni povas legi la tre ineresan projekton re-savi la Aral-Maron (je la uzbeka flanko).

La norda parto – en Kazaĥio jam estas savita plejparte.

https://eo.globalvoices.org/2025/09/15655/

- - -

> simila artikolo – ankoraŭ nur projekto por savi la Kaspian Maron. Kiu estas endanĝerigita de malpli da akvo el la Volgo, poluado de kemiaj kaj nafto-industrioj, eble ankaŭ agrikulturaj fekundenzoj (nitrato).

https://eo.globalvoices.org/2025/04/15176/

- - -

2026-06-15 Nova genetika tekniko por plantoj - Kie ni staras - kiu risko ?

Jen detala informo de la Verduloj en la EU-parlamento. Nur la enkonduko:

En la venontaj semajnoj, oni decidos ĉu EU principe malstreĉigos siajn regulojn por genetike modifitaj plantoj. Se la Eŭropa Parlamento donus sian aprobon en la du ceteraj voĉdonoj, signife pli malfortaj regularoj aplikiĝus al tiel nomataj "Novaj Genomaj Teknikoj" (NGT-oj) - t.e., novaj genetikaj inĝenierartaj metodoj kiel CRISPR/Cas. Ĉi tio reprezentas profundan paradigmoŝanĝon en la eŭropa genetika inĝenierarta juro. El verda perspektivo, ĝi iras en la malĝusta direkto: Ĝi malfortigas la antaŭzorgan principon, endanĝerigas travideblecon kaj biodiversecon, kaj plifortigas la potencon de grandaj sem- kaj kemiaj

kompanioj.

Jen la ligilo al la tuta teksto – en la germana, de Martin Häusling, MEP:

> martin-haeusling.eu/images/Briefing%20vor%20finalen%20Abstimmungen_Neue%20Gentechnik%20bei%20Pflanzen%20FINAL.pdf

Kaj jen pli koncize en la germana kaj franca:

> greens-efa.eu/fr/article/press/ogm-nouvelles-techniques-g%C3%A9nomiques-ntg

= =

2026-05-13 Kuplado da energioj – regionaj solvoj – Saĝaj Energi-Retoj

Jen problemo en multaj landoj, ekzemple el Germanio.

Dum la tempo de fosiliaj energioj (karbo, tergaso (metano) kaj ankaŭ atomenergio) estis facile produkti tiom da kurento kiom oni bezonis. La nacia reto subtenis la dividon kaj stabiliĝon de la frekvenco (50 Hz) kaj tensio (220 V)

La ne-fosiliaj energioj havas problemon:

- manko (dum kelkaj tempoj – malhelaj vintraj tagoj sen vento);
- troa abundo, aparte en norda Germanio (sunaj & ventaj tagoj dum semajnfino),

tiam la prezo de kurento iĝas negativa, ĉar la naciaj retoj ne povas toleri tian abundon. Kaj aliloke oni devas aktivi rezervajn turbinojn, kiuj voras (fosilian) metanon.

Plej bone, se oni trovas manieron uzi kaj stoki la produktitan kurenton en regionaj aparatoj.

Baterioj de domoj kiuj havas PV kaj elektraj aŭtoj povas stoki kurenton plej facile – se multaj estas kunmetitaj en sistemo ili povas eviti malbonajn kurento-pintojn aŭ -mankojn.

Tion oni nomigas: Smart Grid / Saĝa Reto.

Jen detala informo en la germana:

> neueenergie.net/artikel/wissen/infrastruktur/sektorenkopplung-integrated-energy-energiewende

Jen ekzemplo en la germana kaj anlgla lingvoj, do koncize:

Firmao Aurubis en Hamburg rafinas kupron ĉefe el ercoj aŭ el reciklita materialo.

Je tiu procezo ili bezonas altan temperaturon, kun la sekvo ke poste necesas malvarmigo.

Ili nun konstruis gigantan ujon kiu entenos la tiamaniere varmigitan akvon., kaj el tiu rezervo iras reto da varma akvo por la hejtado de ĉ. 20.000 da loĝejoj – eĉ dum somero ili bezonas varman akvon por duŝi aŭ purigado. Ili kalkulis ke tiamaniere ili evitas la eligon da 100.000 t $CO_2$ jare.

> aurubis.com/verantwortung/umwelt-energie-und-klima/energie-und-klima

= =

2026-05-08 Pri klimato kaj milito mi skribis plurfoje, sed kompreneble estas malfacile kolekti ĉiujn datojn. Necesus detaligo pri la jenaj komponaĵoj:

- fuelo el tankoj, kamionoj
- eligo de $CO_2$ dum la produktado de obusoj, rakedoj
- eligo de $CO_2$ dum la produktado de tankoj, kaj alia materialo
- bruligitaj natur-areoj (arbaroj, kampoj)
- eligo je rekonstruado de detruitaj konstruaĵoj kaj alia infrastrukturo
- eligo de metano (ekz-e el tiu gas-tubo Nord-Stream en la Balta Maro) , k.a. gasoj kiuj havas efikon al la klimato, kiujn oni kutime per iu faktoro kalkulas al $CO_2$ (por finfine havi nur 1 nombron por kompari).

Jen kion mi sendis 2022-11-19 pere de AVENO:

2022-11-19 **Militoj kaj Klimato -** Ekzemple pri la nuna milito en Ukrajno Oni kalkulis la eligon dum tiu milito al 100 milionoj tunoj da CO2 (laŭ climatefocus.com)

> climatefocus.com/publications/climate-damage-caused-by-russias-war-in-ukraine/ (kaj laŭ raporto en la germana „taz“ de 2022-11-19, p.12)

En tiu ĵurnalo mi legis - verkita okaze de la klimata konferenco COP-27 en la jaro 2022 en Sharm-el-sheikh, ke dum la unuaj 7 monatoj de 2022 estis eligitaj 100 milionoj tunoj da CO2 (kaj fumo-partikloj) - tio similas al la eligo de Nederlando dum la sama tempo.

- - -

Aliaj fontoj pri tiu temo:

> newsingermany.com/war-and-climate-how-military-conflicts-strain-our-planet/

> bbc.com/news/science-environment-63625693

- tiu ligilo ne plu funkcias rekte - sed ankaŭ donas informojn pri la klimato.

- - --

Jen pli aktuala informo (de la sama gazeto) pri la klimata efiko:
> taz.de/Die-verheerende-Klimabilanz-des-Ukraine-Kriegs/!6157482&s=Ukraine+Krieg+Klima/
La rusa agreso-milito kontraŭ Ukrainio eligis ĉirkaŭ 311 milionoj tunoj da CO2 (supozeble en kunmetita kalkulado pri pluraj diversaj klimato-efikaj substancoj).

- - -

Kaj jen tre detala analizo:
> hintergrund.de/globales/umwelt/krieg-schaedigt-umwelt-und-klima/

= =

2026-04-22 Tago de la Tero !

Komenco de printempo en la norda Tero.

Pastorino ligis ĉi-tiun tagon al la unua fojo kiam homoj vidis la "Tero-Leviĝon" – ĉirkaŭante la Lunon - je 24a Decembro de 1968; jen ŝia konciza parolo en la germana:

deutschlandfunk.de/earth-day-100.html

**26a de Aprilo 1986** komenco de la Eksplodo de la atomenergia centralo en Ĉernobilo.

Tiu okazaĵo montris a) la realan minacon de atomreaktoroj;

b) la malforta flanko de la totalisma sistemo en Sovetunio: ili bezonis plurajn tagojn por sufiĉe klare informi la homojn, ke ili fuĝu, evitu manĝi kelkajn nutraĵojn. Mortis multe pli da homoj ol en la oficialaj ciferoj. Multaj malsanoj okazis, parte ne ligeblaj al radioaktiva poluado pro Ĉernobilo.

**11a de Marto 2011**: komenciĝis ĝis la eksplodo de la atomreaktoroj en Fukushima.

Se homoj opiniis ke nur la maltaŭga registaro en Sovetio respondecis, ili rimarkis ke ĉi-tiu teknologio minacas sendepende de la politika sistemo.

Detalojn vi vidos en wikipedia.org

- - -

Pri Rosatom - en kies reto da atomteknologio (reaktoroj kaj bomboj) troviĝas duona de la mondo

Jen detala analizo de la diversaj subtemoj de ĉi tiu dependeco (en la germana).

> ardmediathek.de/video/die-nuklearfalle/die-nuklearfalle-putins-deals-mit-dem-westen/mdr/Y3JpZDovL21kci5kZS9zZW5kdW5nLzI4MjA0MC81MzEyMzEtNTExMTc3

Tie vi vidos i.a. Vladimir Slivjak de la sovetia Ecodefense NRO; kaj jen ilia retejo kun multaj ekologi-rilataj tekstoj en la rusa.

> ecodefense.ru/

- - -

Alia zorgo prezentas la nuntempajn grandajn militojn: Usono / Israelo / Irano; Rusio / Ukrainio; Sudanoj. Krom miloj da mortintaj, da invalidaj homoj, da detruitaj familoj, sekvis ekologia kaj plirapidigo de la klimata katastrofo.

- - -

Plastaĵoj en maroj, en la stomakoj de multaj bestoj.

Danĝeraj pesticidoj, eternaj venenoj kiel TFA & PFAS;

mikroplastaĵoj en niaj cerboj ...

Do, ĉiu pripensu kion li/ŝi povas kontribui por mildigi tiajn malbonajn efikojn.

Tamen indas ĝoji pri la vivo, kaj laŭeble subteni aliajn kiuj estas en malpli favora situacio.

= = =

2026-03-28   Internacia tago de sovaĝaj herboj

Ili – tiuj kiuj troviĝas sur niaj bedoj aŭ kampoj - ja havas diversajn nociojn: trud-herbo aŭ eĉ fi-herbo. Sed pli korekte estas Sovaĝaj Herboj.

Kaj iliaj nomoj same diversas, eĉ en Germanio ekzistas pluraj nomoj por la sama planto.

Jen ekzempla klarigo el intervjuo de Umweltinstitut Munkeno:

Demando pri la rolo de tiaj ne-kultivitaj plantoj ?

Vanessa: ili ludas grandegan rolon!

La folioj estas la nutraĵfonto por papiliaj raŭpoj, la floroj provizas nektaron kaj polenon por sovaĝaj abeloj, kaj la semoj estas grava nutraĵo por birdoj. Eĉ mortaj plantoj povas servi kiel travintra loĝejo por insektoj. Kaj tiuj estis nur kelkaj ekzemploj.

Ni prenu ekzemple la Ordinaran Ekion (lat: echium), (aŭ eble vipera bugloso ?): Ĝi estas vera supernutraĵo por insektoj, ĝiaj floroj estas ekstreme riĉaj je nektaro, kaj ĝi ankaŭ provizas polenon. La Ekia Mur-abelo ne povus ekzisti sen ĉi tiu planto, sed multaj aliaj insektoj ankaŭ freneziĝas pri ĝiaj floroj, kiel ekzemple la Kolibro-akcipitro-tineo, la kolibro de la papilia mondo. Araneoj ŝatas pendi sur ĝiaj harplenaj tigoj, kaj ĝiaj semoj estas popularaj ĉe birdoj. Ĝiaj radikoj ankaŭ plibonigas la grundon.

Jen la ligilo al tiu intervjuo kiu prezentas du manplenojn da utilaj sovaĝ-herboj. Vi ja povas tradukigi ĝin. Aŭ ĉu vi preferus ke mi tradukigu la tutan artikolon ? Mi rimarkis ke la google-tradukilo ne bone tradukas tiajn malofte konatajn plantojn, kaj serĉis aliloke.

> umweltinstitut.org/landwirtschaft/meldungen/tag-des-unkrauts/?tw_cid=141&utm_source=newsletter

En kelkaj el miaj bedoj estas: germane: Giersch, latine (*Aegopodium podagraria*, eo: egopodio). La tigoj havas specialan formon; tio utilas por klare distingi tiun planton de aliaj, inter ili venena. En la germana vikipedio troviĝas listo kun ĉ. 20 nomoj kune kun la regionoj.

Ties radikaro evoluiĝas ret-forme. Do, ne tro ŝatata de ĝardenistoj. Tamen, mi manĝas la foliojn, kaj

la floroj tre utilas al diversaj papilioj. Inter la radikoj de tiu Egopodio troviĝas pluraj larvoj de rozo-skarabo, ĉar tie ili povas vivi bone; rozo-arbusto troviĝas apude.

= =

2026-03   Renovigeblaj energioj – prezentado de Hans-Josef Fell

temas pri konferenco pri tiaj teknologioj.

**UNC Cleantech Summit in North Carolina, USA** – en la angla:

https://ie.unc.edu/events/cleantech/

Jen lia enkonduka prezentado en 33 paĝoj pri multaj facetoj de renovigeblaj energioj, inkluzive de la maniero instali ilin komune por havi aŭtonoman domon – (plejparte en la angla):

https://hans-josef-fell.de/download/renewable-energies-are-the-key-to-peace-climateprotection-and-economic-recovery/

Jen pli pri ĉi-tiu konferenco (en la germana):

hans-josef-fell.de/2026/03/13/besondere-ehrung-auf-dem-unc-cleantech-summit-in-north-carolina-usa

 - - -

2026-03   Klimataj efikoj – pli kaj pli komplikaj

La 4 plej gravaj klimato-efikaj gasoj (krom akvo) rezultas el kombino inter kvanto kaj specifa efiko estas:

1. $CO_2$ :   65,6%
2. $CH_4$, Methan (Tergaso) :  16,2%
3. $N_2O$, Lachgas : 6,5% relative malgranda kvanto, sed ĉ. 300-obla pli forta efiko ol $CO_2$. Ĝi restas ĝis 200 jaroj en la atmosfero !  La plej granda parto estas hom-kaŭzita, aparte pro artefarita nutrado de kampoj. Pro tio la kampoj pludonas pli da $NO_3$ (Natrio- kaj Kalio-Nitrato) en la marojn; kaj tiu materialo estas konsumita de mikroboj, kiuj postrestas $N_2O$.
4. Fluoro- kaj Kloro-havaj gasoj, $SF_6$, :  11,3%

> deutschlandfunk.de/lachgas-klimawandel-klimagas-treibhausgas-100.html

 - - - krome:

La altiĝo de la tutmonda temperaturo kaŭzas altiĝon de la mara nivelo:

Inter 1901 – 2018 entute je 20mm.

La jara altiĝo pligrandiĝis antaŭ 1971 je 1,3 mm, ĝis 2006 je 1,9 mm, kaj ĝis 2018 je 3,7 mm, kaj 2018 – 2100 entute inter 300 kaj 900 mm (laŭ IPCC), depende de la estonta eligo de forcejaj gasoj.

Jen en la germana, sed ankaŭ sufiĉe detale en Esperanto:

> de.wikipedia.org/wiki/Meeresspiegelanstieg_seit_1850

 = =

2026-03-02  Peticio por salubraj kosmetikaĵoj – sen CMR

La Eŭropa Komisiono volas permesi liberigon de aldono de minacantaj kemiaĵoj en kosmetikaĵoj, inkluzive de parfumoj.

CMR signifas Kancero-gena, Mutagena kaj Reprodukto-toksa.

Mutagena: povas kaŭzi ŝanĝon de DNA, do de genoj.

Reprodukto: se virino estas graveda, ĝi povas kaŭzi genetikan malsanon de la bebo.

Tiaj minacantaj kemiaĵoj estis malpermesitaj – proponita de la Verduloj - de la EU antaŭ 16 jaroj, sed nun la lobio agadis por re-liberigado.

Tiun peticion subskribis 12 EP-aninoj el 8 landoj.

La peticio estas en la jenaj lingvoj: dansk, de, en, fr, it, nl, suomi

> act.greens-efa.eu/de/cosmetics/

- - -

2026-01-05  Torio-Reaktoro en Ĉinio

ĉu tio estas la fina solvo de atomreaktora teknologio ?

Estus interese scii, ĉu tiu tekniko vere ne kunportas grandajn riskojn.*

> youtube.com/watch?v=OiQKiOQSF6Q

*) Komento pri eblaj riskoj: ili komencas je la ekspluatado (medio, akvo-poluado), prilaborado (certe malpli grava risko), "bruligado" laŭdire sen la risko de giganta eksplodo (??), rubaĵo dum kaj post la vivo de tiu reaktoro.

- - -

2026-03-15  Fukushima - tsunamo - komenco de la katastrofo

kaj

2026-04-26  Ĉernobil – 40 jaroj - ankoraŭ lokaj super-radiado kaj isotopoj

Mezaĝaj kaj aĝaj homoj en Europo certe bone rememoras ĉi-tiun katastrofon. Dum tuta jaro oni ne plu manĝis legomojn, lakto estis koncentrita kaj tiu radioaktiva rubaĵo konservita. Oni parolas pri diversaj nombroj da mortintoj, inter 50 kaj 15.000. Krome temis pri misformitaj fetoj, kaj radio-malsanoj. Poste oni esploris tiun reaktoron, kaj trovis diversajn degelaĵojn de la brul-bastonoj kiu atingis temperaturon de pli ol 2.700 °C.

Aparte trafita estis Europo okcidente de Rusio, ĉar la vento blovis unue al Svedio, kaj poste al sud-okcidenta Europo ĝis Bulgario, de tie al okcidento ĝis Francio kaj Hispanio.

Kelkaj opinias, ke tio estis la komenco de la fino de Sovetunio. Unue ĉar la inform-politiko estis katastrofo. Protekto de homoj malpli gravis ol la sekreteco. Due, ĉar la protekto-kvalito de la atomenergio ne gravis, ĉar post la katastrofo (feliĉe ne tro granda) en okcidento oni klopodis instali en novaj reaktoroj pli da sekuro. Do, la fido al tiu sistemo falis.

En okcidenta Europo fortiĝis la kritiko je atomenergio, unue en Aŭstrio ĉar tie falis alt-radioaktiva pluvo / kaj ili reĝignis konstrui la planitan atomreaktoron en Zwentendorf.

Sed ĉefe pro la katastrofo de Fukuŝimo en la 15a de Marto 2011 tiu temo kaj timo atingis kelkajn registarojn.

> eo.wikipedia.org/wiki/Nuklea_akcidento_de_%C4%88ernobilo

Nuntempe lobio denove propagandas - favore al malgrandaj reaktoroj, kiuj ne povas degeli kaj eksplodi, kaj teorie (preskaŭ) ne restus radioaktiva rubaĵo, el kiu oni povus konstrui atombombon. Ĝis nun nur ekzistas (eble 2) provekzempleroj. Pri tio mankas artikolo en Esperanto, do, jen en la germana:

> de.wikipedia.org/wiki/Small_Modular_Reactor

Komento de AVE/ mw: La kostoj de kurento de tiaj SMR atomreaktoroj estas pli altaj ol tiu el alternativaj energioj; eĉ se tiuj bezonas bateriojn aŭ pump-sistemojn por alt-situantaj lagoj.

= =

2026-01-13   Lago Marakajbo en Venezuelo – nafto ....

Venezuelo inter naftaj esperoj kaj realeco

Ĝisdatigita: 13-a de januaro 2026, 3:11 PM Post la usona interveno en Venezuelo,

prezidanto Trump promesis al la naftoindustrio enspezigajn komercajn ŝancojn. Sed la korporacioj retenas sin. La demando ankaŭ restas: Ĉu la nafto rekomencu flui, ĉu la loĝantaro povas profiti?

De Anne Demmer, ARD Meksiko En la naftoregiono Marakajbo, la surfaco de Lago Marakajbo jam brilis toksan verdon en 2024, krucita de nigraj strioj de disverŝita nafto, kiu transformis la lagon en toksan kvazaŭ fekaĵujon. La venezuela ĵurnalistino Sheyla Urdaneta venas de la regiono kaj plurfoje dokumentis. Hodiaŭ ŝi priskribas la amplekson de la media katastrofo: "Ĝi estas ekstreme poluita lago. La fiŝkaptistoj, kiuj eliras, revenas kovritaj de nafto. La nafto algluiĝas al ilia haŭto. La fiŝkaptistoj perdas siajn retojn, ĉar ili ĵetas ilin kaj la nafto igas ĉion glueca."

> tagesschau.de/ausland/amerika/venezuela-usa-oel-wirtschaft-100.html

(dankon al H.J. Fell,  > hans-josef-fell.de )

Sur lia retejo vi trovos artikolojn pri energio kaj medioprotektado en pluraj lingvoj, inkluzive 1 en Esperanto – pri EURATOM.

> hans-josef-fell.de/documents-in-foreign-languages/

= =

2026-01-13  Marĉoj / plurflanke utias je la limo

Belaveŝĉaja Puŝĉa estas nacia parko en Pollando kaj Belarusio.

PL timas agreson el Rusio, ĉar tiu najbaro fakte jam sendis dronojn (ĉu intence aŭ hazarde). Temas pri barado, sed ankaŭ pri protekto de naturo kaj klimato.

Jen konciza raporto, 2:27 min, en 6 lingvoj: fr, de, kaj subtitolita: en, es, it, pl, ro

https://www.arte.tv/de/videos/129508-000-A/polen-moore-als-invasionsschutz/

- - -

2026-01-12   Paŝtado. kaj Biodiverseco / en pluraj lingvoj

Jen interesa iniciativo, kiu ligas ekologiajn spertojn kun lingva diverseco, aparte ĉar ili kreis vortarojn ankaŭ en lingvoj de malplimultoj.

Ankoraŭ mankas la vortaro en Esperanto.

Parte vi trovas tiajn terminojn en la 5-lingva Ekoturisma Vortaro, de Kava-Pech.

https://www.weidewirtschaft-und-biodiversitaet.eu/vokabeln/

(koran dankon al Gereon; lia retejo:  mitfreudeselbermachen.info )

- - -

2026-01-01   Biogaso transportebla modelo

Jen iniciativo kiu subtenas la produktadon kaj uzadon eĉ vendon de biogaso sur bone elpensita, plej baza nivelo:

>be-nrg.com/welcome/

- - -

2026-01-19  Bonvolu subskribi ĉi-tiun peticion por protekti la grundon de la vad-maro

La Vadamaro okcidente de la germana marbordo gastigas kelkajn el la plej gravaj maraj vivejoj de Eŭropo. Tamen, ĝia protekto ekzistas nur surpapere. Ĉi tiuj areoj urĝe bezonas pacon kaj trankvilon por ke mara vivantaro kaj biodiverseco finfine povu regeneriĝi.

La skandalo: Laŭ EU-juro - kiel ekzemple la Viveja Direktivo - Germanio estas laŭleĝe devigata protekti siajn marajn protektitajn areojn kontraŭ damaĝaj agadoj. Sed la malo veras: En 97 procentoj de la Nacia Parko Vadamaro, detrua funda trolfiŝkaptado daŭre

plugas la marfundon. Germanio konscie malobservas aplikeblan median juron!

Kiam politikistoj konscie ignoras leĝojn, laŭtaj protestoj de la civila socio estas necesaj. Ni ne permesos al ministro Rainer transformi la Nacian Parkon Vad-maro en memservan butikon por fiŝkaptistoj!

Jen la ligilo – en la germana:

>mitmachen.duh.de/grundschleppnetzfischerei

- - - fino